

Temoj por diskuto en Kopenhago



Al: Komitatanoj, Sekciestroj, Estraro de ILEI, e-ins, aliaj... 19an de majo, 2011

Karaj!

La nuna komuniko ne prezentas formalan tagordon por niaj kunsidoj en Kopenhago; tio sekvos, kune kun apogaj dokumentoj. Ni volas nun komuniki al vi la plej gravajn temojn por diskuto kaj decido. Vi klare vidas, ke la Komitato en nia ILEI-konferenco en julio havos multan laboron. Tial tre gravas ke via sekcio estu reprezentita, kaj ke vi en viaj landoj diskutu pli frue ol la konferenco plurajn el la temoj. Ene de tagoj ni sendos al vi la elektronikan formularon por, se necese, anonci viajn anstataŭantojn. Antaŭ tio, ni volas doni antaŭguston de la traktotaj temoj. La nuna listigo neniel estas kompleta.

1. Revizio de la Statuto kaj Regularo

Jen la plej granda tasko. Vi ricevis komunikon pri la ĉefaj principaj demandoj, baldaŭ vi ricevos precizajn teksto-proponojn. Precipe tio bezonas multan antaŭdiskuton. Ni planas en Kopenhago trakti la tekstojn enkonduke kaj fine, sed lasi detalajn vortumojn al dum-konferenca komisiono.

2. Trakto de nova regularo por la Scienca Komitato de IPR

Tion ni nun pretigas, surbaze de delonge ricevita propono. Ni celas koncizan regularon, suplementata de gvidilo, kies finan prilaboron ni delegos al la universitata komisiono.

3. Honoraj Membroj

Ne venis proponoj de la sekcioj. La estraro havas du proponojn, kiujn ni povos prezenti nur post la fino de nuntempe okazanta ret-voĉdono de la Komitato pri modifo al la koncerna regularo.

4. Elekto de nova Elekto-komisiono

Same tio dependas de la rezulto de la komitata voĉdono. Tio proponas en Kopenhago okazigi elektojn por elekto-komisiono prepare al la estrarelektoj en 2012. La estraro sondas ĉe la nunaj membroj pri preteco pluservi.

5. Kotizoj 2012

Aprilkunsido, la estraro decidis proponi modestan altigon de la membrokotizoj kaj abontarifoj al *Juna amiko* ekde la 1a de januaro 2012; kun la eblo kotizi por 2012 laŭ la nunaj sumoj ĝis la fino de la nuna jaro.. Ĝi tion faris pro la granda sed komitate akceptita deficito en la buĝeto por 2011 kaj pro la konstato, ke ne eblas kontinue prezenti deficitajn buĝetojn. Proponate altigi la A-landan membrokotizon de 18 ĝis 20 eŭroj kaj abono al *Juna amiko* de 14 al 16 eŭroj. Lastaj altigoj okazis antaŭ pli ol ses jaroj. Detala propono sekvos.



6. Ampleksigo de traduk-reto

ILEI suferas kritikan kaj kripligan mankon de laborfortoj. Konkreta bezono estas reto de tradukistoj, por rapide liveri nacilingvajn tradukojn por aldono al nia nova mult-lingva reto. Ni alvokas jam nun, ke via sekcio nomumu kunlaboranton. En Kopenhago ni ampleksigos la liston.

7. Strategio kaj laborfortoj por eksteraj rilatoj

Momente ni apenaŭ havas fortojn plenumi niajn planojn. Ni bezonas kunlaborantojn, por ke indu formuli planojn elpaŝi inter malmovadaj edukaj instancoj.



8. Novaj kaj silentaj sekcioj

La Komitato devos decidi kiel trakti la tri sekciojn, kiuj ne plu havas sekciestrojn kaj ĉesis funkcii – en Rusio, Britio kaj Irano. Se venos aliĝpeto (ekzemple en TAKE) la Komitato povos trakti tion.



9. Konfirmo de retaj decidoj

Laŭ la regularo pri reta voĉdonado, la Komitato revizitos la decidojn faritaj rete de post aprilo 2011.

Viaj proponoj bonvenaj!

Sekcioj, komitatanoj kaj membroj rajtas proponi temojn por diskuto aŭ decido. Anticipe ricevitaj temoj estos diskonigitaj al komitatanoj, kaj ricevos prioritaton super malfrue alvenintaj aŭ surloke levitaj temoj. Bv. atenti tion, ĉar ni havos ege plenan tagordon!

Kore salutas, nome de la estraro:

Stefan MacGill, Prezidanto de ILEI